



madrida esperanto-liceo

marto 2011

NOVA PROJEKTO "PONTOLINGVO"

Sekve al la diversaj raportoj disvastigitaj en amaskomunikiloj dum pasintaj semajnoj pri la altkvalifikitaj hispanaj laboristoj kiujn Germanio bezonas por laborigi tie, kaj la postuloj pri alta nivelo pri la germana lingvo, la prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo proponis en kelkaj esperantistaj retlistoj la lanĉon de projekto "Pontolingvo", por profiti tiun lingvajn postulojn.

La celo estas uzi Esperanton estonte kiel pontolingvon inter eksterlanda entrepreno kaj la hispanaj dungotoj. Esperanto tiel taŭgos por la unuaj semajnoj/monatoj por sufiĉa interkompreniĝo inter ambaŭ partoj ĝis kiam la necesa lernado de la tiea nacia lingvo ebligas la iompostioman anstataŭadon de Esperanto per la nacia lingvo.

La unuaj fazoj kiuj nun disvolviĝas, konsistas en la informado al la hispana movado ke tiu ĉi projekto estas naskiĝanta por kapti interesigojn kiuj povos opinii, plibonigi kaj disvolvi la projektan planadon kaj en unua kontakto kun germanaj aktivuloj kaj organizoj, por klarigi la projekton al ili kaj peti al ili ties dissendon tra la germana geografio.

En postaj fazoj, la germanaj kunlaborantoj serĉu entreprenojn konvenajn, t.e. bezonantajn laboristojn eksterlandajn kaj kies ĉefa laboragado ne supozus trakti civitanojn, kaj post trovado de entreprenoj kaj laboristoj, oni organizos la kursojn kaj disvolvos la ceteron de la projekto.

M.E.L. serĉas nun kunlaborantojn kaj interesitojn. Bonvolu konigi vian pretecon kaj ideojn al la adreso de la Liceo: saluton@wanadoo.es

EKSKURSO AL ALMADENO

La famegaj minoj de Almadén estas la plej granda en la mondo ekspluatejo de mineralo cinabro, el kiu produktiĝas la likva metalo hidrargo. Nur antaŭ kelkaj jaroj la produktado ĉesis pro nepluuzado de hidrargo, kaj nun viziteblas la imponaj instalaĵoj, putoj kaj tuneloj. Madrida Esperanto-Liceo organizas viziton al la mina komplekso por la unua semajnfino de aprilo, kun jena programo:

Eliro je la sabato 2-a de aprilo. Oni povas veturi per aŭto, sed ankaŭ eblas komuna vojaĝo per regiona trajno, kiu ekiras je la 13:28 h el Madrid-Atocha. Je la 18:00 h komenciĝos vizito al la vilaĝo: sesangula deksepjarcenta taŭroludejo, kastelo, preĝejoj, antikvaj domoj, ktp.

Dimanĉo 3-a de aprilo je la 10:00: Gvidata vizito al la Mina Parko. La vizito daŭras ĉirkaŭ tri horojn. Prezo: 12 eŭroj. MEL antaŭrezervos por la tuta grupo meze de marto, sciante kiom ni nombras. La trajno revenas je 15:50, kun alveno en Madrid-Atocha je 20:06

Gastado: MEL havas liston de hoteloj de la ĉirkaŭaĵo, kiun oni povas peti en ties adreso. Tamen, MEL ne zorgas pri la rezervado, krom se iu el la partoprenontoj trovos interesan ofertan, kaj en tiu kazo oni informos en la kutimaj adresoj de la Liceo.

70-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Daŭras la preparoj por la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en San Lorenzo de El Escorial (Madrid) inter la 28-a de junio kaj la 2-a de julio de 2011.

Kiel informite en nia lasta numero, la 3-an de julio, dimanĉe, okazos postkongreso organizota de la Liceo, en la urbo Madrido, pri kies detaloj ni baldaŭ informos.

IBERIA RENKONTIĜO

Iberia Renkontiĝo estas ĉiujara esperantarango okazanta ie en Iberio kunorganizata de Portugala Esperanto-Junularo, Hispana Esperantista Junulara Societo kaj Kataluna Esperanto-Junularo. La ĉijara renkontiĝo okazos de la 13-a ĝis la 15-a de majo en regiono de Ĝirono: la programeroj okazos en gastejo Can Maiol en urbeto Sant Andreu Salou, kaj ankaŭ en la centro de Cassà de la Selva kaj en Ĝirono.

Kelkaj madridanoj kaj ĉirkaŭmadridanoj planas komunan vojaĝon. Petu informojn de Liceo.

Pliaj informoj en <http://esperanto.cat/ir2011/>.

ESPERANTA FAKO EN MADRIDA LIBREJO

La 11-an de marto okazos en la anarĥiista librejo "La Malatesta" (strato Jesús y María, 24 - Madrido) prezentado de la libro "Anarquistas - Un siglo de movimiento libertario en España". La prezentadon realigos la aŭtoro mem, Dolors Marin. La libro entenas tutan ĉapitron dediĉitan al esperanto, proksimume 40 paĝojn, pli malpli dekonon el la tuta verko. La evento ekos je la 7h 30m, kaj ĝin planas partopreni diversaj anoj de SATeH, kiuj rendevuos iom antaŭe.

Pli grave: la citita librejo planas malfermi esperantan fakon, kiun nutros la libroservo de SAT-en-Hispanio. La sekcio komenciĝos la 8-an de aprilo, per evento publika, kie anoj de SATeH prelegos pri la rilato inter Esperanto kaj liberecanaj medioj.

EN AMASKOMUNIKILOJ

Radio Exterior de España dissendis la 8-an de februaro intervjuon pri nia lingvo al Toño del Barrio, direktoro de Fundación Esperanto. La 20-minuta registraĵo aŭdeblas per jena ligilo: <http://www.rtve.es/mediateca/audios/20110208/descubrimos-como-esperanto-jose-antonio-del-barrio-puntos-vista/1009888.shtml>

Alia intervjuo, ĉi-foje en Radio Nacional de España, en ties programo "Esto me suena" de la 10-a de februaro, kun la prezidanto de HEF, Pedro Hernández, aŭskultebblas pere de la ligilo <http://www.rtve.es/mediateca/audios/20110210/esto-suena-aprendemos-hablar-esperanto-10-02-11/1013078.shtml>

NI KONDOLENCAS

Forpasis Eusebio Navas Hernández, membro de MEL de antaŭ dekkvar jaroj. Li estis alt-aĝa kaj de kelka tempo ĉesigis sian kutimon viziti la lundajn kunvenojn. Do ni vizitis lian hejmon, kie najbarino konfirmis la malgajan informon.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Gvidata de Pedro Hernández, komenciĝis en la sidejo de Rodríguez San Pedro progresiga kurso de Esperanto. Ĝi okazas ĉiujn sabatojn matene, de la 11:00 ĝis la 13:00 horo.

Dum venontaj monatoj, niaj konversaciaj rondoj plu okazos regule ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3^o-7, tel. 914 468 079. Pri aliaj renkontoj, atentu retforumon [esperanto_madrde](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrde) http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrde.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4^oB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com